

N. N. 12,

## Nek fajro, nek la karb'

*tradukita de Joachim Gießner*

1. Nek fajro, nek la karb'  
brulas per tia arda flam',  
|: kiel amo sekreta,  
enŝlosita kora am'. :|

2. Nek rozo, nek diant'  
floras en tia belec',  
|: kiel du geamantoj  
kunstarantaj en solec'. :|

3. Ho mia tuta koro  
ja estas spegul'.  
|: Ĝi montras, ke mi vin amas,  
ĉiam restos fidelul'. :|

*Traduko de la Germana poemo "Kein Feuer, keine Kohle" de N. N. 12 en Esperanton de JOACHIM GIESSNER (\*1913-12-23 – †2003-11-25).*

*Arg-395-785 (2007-03-28 10:52:07)*

*Mi, Manfred Retzlaff, detajpis tiun tradukon de Joachim Gießner el folio kun letero, kiun skribis al mi en 1987-11-24 s-ro Joachim Gießner.*